

LUCERNO



(Bulteno de la Japana Sekcio de ILEI) n-ro 15 oktobro 2017

La 50-a ILEI-Kongreso en Busano

ISIKAWA Tieko



Por mi ĉi-foja ILEI-Kongreso estis la okafoja; mi partoprenis en ILEI-Konferencoj en Parma (2006), Ranzan (2007 kiel ĉeforganizanto), Portonovo (2008), Krakovo (2009), Kunming (2012), Montevieo (2014), Nyirezyhaza (2016) kaj Busan ĉi-jare. La nomo de tiu ĉi por ILEI la plej granda jara evento ŝanĝiĝis de “konferenco” al “kongreso” ekde ĉi-jaro, ĉar la karaktero de la evento iom post iom ŝanĝiĝas lastatempe kun la kresko de partoprenantoj, kiuj ŝajne interesiĝas ne pri fakaj, edukaj programeroj sed pri aliaj programeroj kiel ekskursoj. La vorto “konferenco” havas nuancon de renkontiĝo de iuspecaj fakuloj, do ILEI-komitatoj tial decidis uzi “kongreson”-n en la lasta konferenco en Nyiregyhaza.

Ĉiu konferenco variis je la nombro de partoprenantoj. La plej malgranda, el kiujn mi partoprenis, estis tiu en Portonovo, Benino en Afriko. Kaj ĉi-jara kongreso estis la plej granda laŭ la nombro de aliĝintoj, t.n. 196. Alvenis 170 (inter ili 20 estis unutagaj vizitantoj) sed multaj el ili aŭ laboris kiel LKK-anoj kaj helpantoj aŭ ĝuis ekskursojn, do efektive malmultis personoj, kiuj pozitive ĉeestis en diversaj programeroj kiel prelegoj, pedagogia foiro, instruista trejnado, diskutrondoj pri diversaj agadoj en lernejoj, kursoj por komencantoj kaj progresantoj, literatura kafejo, ktp.

S-ro Tabuĉi Yasuo, unu el la partoprenantoj de ĉi-foja kongreso, ne ILEI-ano, raportos pri la kongreso en la oktobra numero de la Revuo Orienta, tial mia skribaĵo ĉi tie priskribas nur kelkajn epizodojn kiun mi havis dum la kongreso. Krom s-ro Tabuĉi kaj mi, partoprenis el ILEI-JP s-ino Ueno Yuriko kaj belmonto s-ro Yamasita Tosihiko.

ENHAVO

- 1.....La 50-a ILEI-Kongreso
en Busan
(石川智恵子)
- 2.....La 50a ILEI-Kongreso
en Busano
(上農百合子)
- 4.....エスペラント教育者連盟
世界大会
(田渕八州雄)

E-kurso por progresantoj, kiun gvidis tre sperta gvidanto s-ro Sylvain Lelarge el Nederlando, estis tre interesa kaj inspirplena. Mi ĉeestis en du kursoj el la tri de li gviditaj. Ni estis inter 15-20 kaj la nivelo de la kursoj estis relative alta kaj ni bezonis multe da vortoprovizo. Mi sentis, ke mankis al mi ankoraŭ multaj vortoj, precipe vortoj por esprimi manĝaĵojn, ĉiutagajn uzaĵojn ks. Interese estis la grupoagado en du grupoj; en unu grupo homoj interkomunikiĝas ne per parollingvo sed per kololigitaj kartoj kaj gestoj, kaj en la alia homoj parole interkomunikiĝas. Kio okazos se homoj el tiuj du grupoj renkontas? Kiamaniere ni komunikiĝos unu kun la alia? Laŭ mi, tia ludo estis iom komplika kaj malfacila, kaj mi ne povis sufiĉe ĝui ĝin. Ŝajnas, ke ankaŭ aliaj aziaj ĉeestantoj iom embarasiĝis. Sylvain fakte estas bona gvidanto, sed mi opinias, ke li tro ofte uzas vortojn nekutimajn al ni azianoj. Eŭroplingvanoj povus facile diveni la signifojn sed ni ne. Mia ĉi-foja sperto rememorigis al mi la prelegon de s-ro KIMURA Goro pri “Kiel Esperanton en Orienta Azio instrui?”. Mi ne havis kuraĝon diri al Sylvain, ke li uzu pli facilajn vortojn, ĉar la kurso estis por progresantoj! Li havas lian manieron instrui Esperanton, kiu estas ofte tre ŝatata de multaj homoj sed tio ne signifas, ke ĝi ĉiam taŭgas ankaŭ por ni azianoj. Certe ni bezonas mem trovi pli taŭgajn instrumanierojn en Azio, kvankam tio ne estos facila laboro.

Ĉar ILEI-Kongreso estas multe pli malgranda ol UK, la partoprenantoj povas facile interkonatiĝi kaj amikiĝi. Mi konatiĝis kun s-ino Irina Goncharova el Moskvo, kiu fondis interesan projekton “Esperanto Poŝtkruciĝo” (alipaĝe troveblas la informo pri la projekto) kaj tre vigle aktivis en Moskvo. Mi ankaŭ spertis hazardan renkontiĝon kun alia rusino s-ino Elena Sharavina, dek jarojn poste de la UK en Jokohamo. Tuj post la tertremego kaj akcidentoj de nukleocentraloj en Hukuŝima en 2011, ŝi sendis al mi retmesaĝon dirante, ke ŝi akceptos min kaj mian edzon ĉe ŝi en Krasnoyarsk. Ni tiam estis ege kortuŝitaj pro ŝia simpatio. En la foto sidas mi kun Elena.

La 51-a Kongreso de ILEI okazos en Madrido, de la 21a ĝis la 28a de julio, 2018. Mi ankoraŭ ne certas pri mia aliĝo sed mi diru, ke ILEI-Kongreso indas partopreni. Mi ĝojos, se iu el nia sekcio iros al Madrido venontjare.

La 50-a ILEI-Kongreso en Busano

UENO Yuriko

Ĉi-jare ILEI-Kongreso okazis en la urbo Busano, Koreio. La aliĝintoj estis ĉirkaŭ 208 homoj el 29 landoj laŭ la kongresa libro. Oni trovis multajn partoprenantojn sur la nomolisto, tamen la kvarono da aliĝintoj ne aperis en la kongreso pro la politikaj aferoj. Sed multe da esperantistoj nombriĝis kompare kun la lastaj jaroj. Kaj same kiel la lastaj kongresoj diversaj programeroj troviĝis, ekzemple, prelegoj, diskutoj, instruista trejnado, kursoj k.t.p. La programeroj de la ILEI-Kongreso enhavas karakterizajn programerojn: Frandvesperon kaj Lingvan festivalon. Tiuj tre interesis min, kia kaj kiel oni havos tiujn programerojn, kiam mi la unuan fojon partoprenis en la kongreso (en tiu tempo la ILEI-Kongreso nomiĝis ILEI-konferenco). En frandvespero partoprenantoj kunportas siajn proprajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el sia lando kaj regalas per la aĵoj al alilandaj partoprenantoj. Tamen ĉi-okaze koreaj organizantoj preparis

preskaŭ tuton, ekzemple korean moĉion, kukojn kaj fruktojn. En lingva festivalo partoprenantoj havas ŝancon prezenti sian nacian lingvon al urbanoj, ne-esperantistoj. Ĉi-jare ni okazigis ĝin en la placo, kie troviĝis la halo por filmfesto. En la lingva festivalo unu korea mezlernejano kaj ĉinaj studentinoj respective vizitis la japanan budon kaj ili prezentis sian scion pri japana lingvo. Kaj ni kune amuzis nin per la parolo de japana lingvo. Koreio kaj Ĉinio situas najbare de Japanio, pro tio ili havas interesiĝon pri japana lingvo, mi supozis. Ĉiaokaze mi tre ĝojis, ke gejunuloj interesiĝis pri japana lingvo. Kaj en la ILEI-Kongreso troviĝas distraj programeroj, nome, internacia vespero, bankedo kaj ekskursoj.

Pri miaj spertoj en la 50-a ILEI-Kongreso

Mi ĉeestis du programerojn, unu estis la instruista trejnado de s-ino Katalin Kováts, la alia estis la E-kurso por progresantoj de s-ro Sylvain Lelarge. S-ino Kováts ofte menciis pri la retejo "edukado.net", per kiu komencantoj, progresantoj povas progresigi sian kapablon pri Esperanto, kaj gvidantoj povas trovi diversajn materialojn por instrui Esperanton. Kaj ŝi rekomendis al la ĉeestantoj membriĝon en ĝi. La retejo estas tre utila por komencantoj aŭ gvidantoj kaj mi tre emociiĝis de ŝia parolo. Tamen mi ankoraŭ ne vizitis la retejon pro mia maldiligenteco. Poste mi vizitos la retejon, certe. Mi raportas pri la Esperanto-kurso de s-ro Sylvain Lelarge, kiu gaje gvidis la partoprenantojn kun la granda gesto kaj klara voĉo, kvazaŭ li mem amuzus sian rolon. La gvidantoj bezonas tiajn manierojn por lernantoj, mi opinias laŭ mia kariero. La ludo, kiun gvidis s-ro Sylvain Lelarge kaj s-ino Mireille Grosjean (la prezidanto de ILEI) estis enigmo. Mi ne komprenis eĉ nun, por kio ili havis la ludon? Bedaŭrinde mi ne povas klarigi la enhavon, pro mia manko de esprimkapablo.

Mi revidis kelkajn esperantistojn, kun kiuj antaŭe mi konatiĝis en esperantaj renkontiĝoj en Tajvano, Koreio kaj Francio. Kaj ĉi-foje mi amikiĝis kun s-inoj Gaja kaj Ella en Koreio. Mi havas intimecon al koreaj esperantistoj pro la najbara lando kaj la ligo de historio inter Koreio kaj Japanio de la malnova tempo, kvankam ne bonaj aferoj ekzistas inter la du ŝtatoj nun.



① レッスンの流れ

『豚の種』実演（6分）、その後、参加者に

(a)鑑賞しての感想を聞いた。

(b)作者はどんなメッセージを読者に伝えたいのか？についての質疑応答

『与える木』実演（7分）、その後、参加者に

(a)鑑賞しての感想を聞いた

(b)作者はどんなメッセージを読者に伝えたいのか？についての質疑応答

② 学びの目標

(a)紙芝居を観て楽しむことができる

(b)未知の単語を聞いて、絵や文脈から意味を察することができる

③ 指導の目標

(a)聞き取りやすい、ゆっくりとした声で読み聞かせる

(b)ナレーター、登場人物の違いを際立たせて演じる

(c)作者がどんなメッセージを伝えようとしているのか考えさせ、みんなで分かち合う

(d)紙芝居の読み聞かせを通じて子ども達に、そのお話が内包している『人生の美德』を味わわせてあげたい。

(例えば、kuraĝo, elteno, helpemo, komprenemo, amo, konsidero など)

④ エスペラント教育者連盟の会長であるミレーユ・グロジャンさんから、以下のようなコメントを頂いた。『祖父母が小さい孫を抱いて話をしてあげるとその声が孫が大きく成長した時も脳裏に残り、その子の心の糧となる。読み聞かせは大切な教育の一環である。』

(b) 7月18日（火）公開番組：言語フェスティバル（Lingva Festivalo）

午後2時30分～6時に開催

一般の方対象の番組として釜山映画センターで『言語フェスティバル』が開かれた。この日には、このセンターで若者が集まるイベントがあり、その帰りに若者や保護者がこのエスペランチストが開く『言語フェスティバル』に立ち寄って、いろんな国の言語に触れて頂くことが目的であった。勿論、その説明をしている各国のエスペランチストに触れていただく、エスペラントに興味・関心をもつていただくことも大きな目的であった。20の机が用意され20ヶ国の言語が紹介された。ただ残念だったのはエスペラント国のコーナーがなかったことだ。沢山の方が立ち寄ったわけではなかったが、地元の新聞社が日本語コーナーの山下さん、石川さん、上農さんの3人が説明なさっているところを記事にしていた。（ひらかな、五十音図の説明、折り紙の紹介、日本語の挨拶等がなされた、参観者の質問にも答えていた。（写真参照）

(c) 7月21日（金曜日）

山下敏裕さんの発表”Raporto el miaj aŭdokursoj “を聴講

聴き取りのためには、語彙力、文法力、背景知識、文化、文脈の知識等を含めた総合的な力がないと難しい、だから、聴き取り能力向上の為の近道はないと私は感じた。

(d) 7月17日（月）Internacia Vespero

各国の人がその文化（踊り、歌、楽器演奏）等を紹介する機会があった。私は自称『阿波踊り宣伝使』という使命感と世界の amikoj に楽しんで頂きたいという気持ちから阿波踊りを披露した。既に私の踊りを気に入ってくれている韓国の amikoj を初めとしてダンスの好きな方が踊りの輪に加わっていただけて幸せであった。

(III) 感想

- 1) ソウルでの世界大会とは違い少人数の参加者、そしてエスペラントの教育に携わる人たちの参加なので目的意識が同じである。その為互いに親密に交わることができた。
- 2) 大会の会議書 (Kongreslibro) が大会の前日に出来上がった。大会についての詳細な案内が出なかった。ILEI のあとに複数の大会【ソウル世界大会、SAT kongreso、” Bonvenon al Ŭonbulismo” (円仏教瞑想セミナー)】が連続して開かれ、一人の方が複数の大会に関与している多忙のせいでもあったと想像している。
- 3) 地元のエスペランチスト (釜山、晋州、馬山、大邱、ソウルからも) が献身的にお世話して下さっているのは有難いことであった。
- 4) 少ない地元スタッフに代わって、Belmonto 山下さんのように韓国語が話せて釜山に詳しい方が半日観光のガイドのサポートをなされたことは地元のエスペランチストにとってはありがたいことであった。日韓の友人の協力は大切と感じた。
- 5) 個人的なことではあるが、長い間、コンピューターの画面上 (SKYPE) で話してばかりで、実際に顔を突き合わせて今まで話したことのなかった Aleksey Borodin さんと現地であえて、とても感激した。

2) ソウル世界大会 (UK)

大会テーマは『観光と発展：継続可能な道』

Kiam? : 7月22日～7月29日

Kie? : 韓国外国語大学 (1954年創立)

Kiom da? : 61ヶ国から1137名の参加者 (7月27日段階)

Kio? : プログラムは、エスペラント講習、観光、韓国の夕べ、国際の夕べ、講演、韓国語の速修講座、教師訓練講座、晩餐会、映画会、各種分科会、コンサート、劇、合同礼拝、国際夏季大学、雄弁大会、サッカーの試合、展覧会など。

(注) ソウルでの世界大会は、釜山での教育者連盟世界大会の大型版である。

とにかく規模が大きい、参加者数が半端な数字ではない。参加したい番組を選ぶのに苦労した。

① ソウルプロジェクトで10名のEPAの青少年が参加!

2年前のフランス・リール世界大会に参加した際に、どの国も参加者が高年齢化しているのを感じた。EPA もしかり、なんとか「若者にエスペラント体験をして欲しい!」「後継者が育てて欲しい!」という願いから始まった2017ソウル世界大会プロジェクトに全国から10名の大本青年が参加。無事に、その使命を果たし世界のエスペランチストと交流できたことは何よりの収穫であった。浄財と『頑張れ!』というお気持ちを頂いた信徒の皆様には感謝の気持ちで一杯である。Koran dankon!

② 讚美歌 (愛善歌) の合唱～祈りと場所と空間を共有

神戸の平井淳氏と「円仏教との合同礼拝が世界大会でできないか?」と話しかけていた時に「合同礼拝が実現できなくても大本と円仏教、お互いの賛美歌を共に、エス語で歌うことができるのではないか?！」という意見が出た。この提案をEPA本部にさせていただき、円仏教側もいい提案だということでお互いが、双方の分科会に参加しての合唱が実現した。

7月24日(日)午前には開会式が終わり、午後4時から大会場から歩いて7分の円仏教のお寺で円仏教の分科会が開かれた(約100名の参加者数)開祖のSotesano師と教を解説したDVDの鑑賞のあと賛美歌が歌われた。円仏教11名(伴奏者1名)大本青年10名とEPA-anoj 9名が参加。

合同礼拝ではなかったものの、共に平和を祈る時間と空間が共有することができて幸せいっぱいな気持ちに満たされた。至福の瞬間であった。

③ エスペ란チストの韓国国会訪問

『2017年7月28日に韓国国会で21ヶ国130名のエスペ란チストが参加しての国がなされた。その集会には韓国国会の副議長、2つの政党の代表と議員も参加した。集会司会のソ・ギルス博士と14名のパネラーの間で熱い議論がなされた。すべての参加者はマスコミや歴史の本や、旅行や、出会いから情報を得ていた。そのことが意見交換を豊かなものにした。この橋渡しとなる集会はソウル市の後援を得て韓国エスペ란ト協会がエスペ란ト世界大会の枠の中の行事として開いたものであった。その議論はエスペ란ト語でなされた。エスペ란チストでない方の為に同時通訳が行われた。

参加者の言語の違いにもかかわらず、国際共通語エスペ란トを使って参加者はこの平和集会でなんの問題もなく意見交換ができた。』

(エスペ란ト教育者連盟の会長であるミレーユ・グロジャン氏＝王仁三郎 賞の受賞者が大会速報情報誌”La Kandellumo Verda”誌に寄稿された記事を掲載)

④ UKでの王仁三郎賞 ⇒ KSが受賞

世界のエスペ란トの活動に大いに貢献された人(または団体に)出口王仁三郎賞が1987年に授与されから今年30年の節目の年にあたる。29日の閉会式の後半部で、EPA会長が直々に王仁三郎賞の授与をした。今回の受賞者はKS(=Komuna Seminario)であった。

Komuna Seminarioは1982年に第1回のセミナーが韓国ソラク山で開かれた。韓日の103名の若いエスペ란トが集い、相互理解と親睦を深めるのが目的であった。テーマは「何のためにエスペ란トは存在するのか? エス語教育の最善の方法」であった。以後毎年日韓交互に開催された。1995年からは中国のアミーコも参加、2010年からはベトナムのアミーコも参加! 実質的にアジアの若者を継続して活動家として育てる役割を果たしてきた。1982年の第1回のセミナーに参加した韓国のエスペ란チストが今回の世界大会で中心的な働きをしている。

アジアからヨーロッパへエスペ란トを逆輸出するというお考えをお持ちだった出口王仁三郎師、今回の王仁三郎賞は、とても時に適って素晴らしい選考だと感じた。

長い韓国での旅を楽しく、無事に終えられたこと、韓国の友人にお世話・歓待して頂いたことに対して感謝の気持ち一杯で帰途についた。

Koregan dankon!

-
- ☆ [Ilej-jp ホームページ](http://ilej-jp) <http://ilei.jp>
☆ [メーリングリスト](mailto:ileijp@ml.allserver.jp) ileijp@ml.allserver.jp
ILEI-JP 代表 石川 智恵子 tiekosanjo_103@bj8.so-net.ne.jp
ILEJ-JP 機関誌編集 木谷 奉子 kitanitomoko5@gmail.com
belmonto amiko.mia@gmail.com
-